



JEN BULTEN⁹



JANUARO
FEBRUARO
1965



PREZENTAS AL
SPECIALAN
JEN-PROGRAMON
EL INDIANA



5.11

JEN-Bulteno Organo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko
Januaro-Februaro, 1965

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue,
Allston, Massachusetts 02134

Sendu materialon por la JEN-Bulteno portempe al:
Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Apt. 6, Cambridge,
Massachusetts 02138

Ĉi tiun numeron redaktis:
Duncan Charters, 207 East 16th, Bloomington, Indiana 47403

Estraro de JEN:

Stanley F. Cohen Kasisto
Ann Bodine Sekretario
Humphrey Tonkin Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj
Richard P. Kollin
Jonathan R. Pool
Robert Davis

Reprezentantoj al JEN:

Arthur Morse Okcidenta Massachusetts
Naomi Sabghir Universitato de Maryland
James Craighead Long Beach Polytechnical H.S.,
Kalifornio.
Pat Spaeth San Diego
Nelly Perez Yip Portoriko
Fred Shell Universitato de Kalifornio,
Berkeley.
D-ro R. Ring Muhlenberg College,
Allentown, Pensilvanio.

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja nivelo elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton al JEN. Sendu la nomon de la reprezentanto al la Sekretario.

Ĉiujn ĝeneralajn komunikojn oni sendu al la Sekretario --
F-ino Ann Bodine, Sage Hall, Cornell University, Ithaca,
New York, 14850.

N I P E N S U !

Kiam mi estis petita redakti ĉi tiun unuan numeron de la JEN-Bulteno por 1965, mi akceptis tion fari en la espero, ke mi tiel kuraĝigos al aliaj JEN-anoj kaj JEN-grupoj samcele proponi sin ek de la nuna jaro. JEN estas kolektivo de siaj membroj, kaj nenio pli gravas al kolektiva laboro ol la disdivido de taskoj kaj trafa utiligo de ĉies talentoj. Je la tempo de mia forlaso de Anglujo por daŭrigi miajn studojn en la universitato de Indiana, la eldonado de la bulteno de JEB "Kial Ne?" tiom dependis baze de unu persono (ek de tajpado, ofte eĉ verkado kaj reverkado, ĝis ekspedo) ke fariĝis poste preskaŭ neeble al la restantaj oficantoj de JEB daŭrigi la laboron. Ankaŭ ĉe ni ĉiuj JEN-anoj havas la respondecon certigi, ke tia stato ne ekvenkos nin. Dum la pasintaj monatoj la danĝero ja minacis, kaj ĝi ankoraŭ minacos ĝis ni konscios ke la potenciala sukceso de JEN kaj ties Bulteno dependas de ĉiu el ni kiel individuaj kaj grupaj membroj de la organizo. Per daŭra kunlaborado intere de JEN kaj ekstere kun ekzemple JEB en Britujo, la membroj povos nur profiti el la pli altkvalita materialo disponebla kaj el la pli racia divido de la laboro.

El persona vidpunkto, mi konstatis de la unua semestro de mia studprogramo ke, krom se ne gravos al viaj celoj ĉu vi restos dum dek jaroj aŭ pli studento, kaj dum pluaj dek jaroj nedoktoriĝinta lektoro, oni devas en Usono labori je tia intenseco ke absolute mankas tempo por eĉ iri al teatraĵo aŭ koncerto unu fojon semajne - por ne paroli pri simpla respondado al leteroj kaj senesperaj penoj por prepari antaŭ fiksitaj limdato eldonon de la JEN-Bulteno... En la nuna stadio, do, ne atendu anoncojn pri novaj mondskuaj venkoj por Esperanto en la ŝtato Indiana, tamen anstataŭe per la nuna numero de la JEN-Bulteno ni provis kunigi kaj ideojn stimulaĵojn al pensado kaj ekrealigo de urĝaj projektoj, kaj humoron nemankendan al la juna generacio de zamenhof-adorantoj.

Ĉu vi iam pensas kaj ŝatus libere esprimi viajn ideojn en formo kiu plej efike trafos la mensojn de la ne jam de vi enlumigitaj samideanoj? Ĉu vi ne ofte ridetis pri io kio ŝajnas al vi aparte stranga aŭ amuza en la Esperanto-movado? Se jes, vi havos neniajn problemojn ĉe la redaktado de JEN-Bulteno. Se vi ne sentas vin kompetenta prizorgi tutan numeron, almenaŭ ek de la nuna jaro pensu ĉiam kiam vi ricevos numeron de la Bulteno, kion mi povos kontribui al la venonta? Se ĉiuj niaj membroj celus por ĉiu numero kontribui artikolon, ŝercon, informon, recenzon, aŭ eĉ dulinian opinionon aŭ ideon, ni rajtus nomi nian organizon aktiva. Se vi estas universitata studento, ĉu vi dum seminarioj neniam kuraĝas malfermi la buŝon, sed restas kontenta pri tio, kion diras la profesoro kaj la aliaj studentoj? Se jes, ĉu vi vere opinias vian

laboron kontentiga? Se vi konsideras vin juna, aktiva Esperantisto, ĉu vi estas kontenta lasi la forumon de la JEN-Bulteno al aliaj, ensorbinte ĉies ideojn kun reago nur mense pozitiva, negativa, aŭ neŭtrala? Kiam vi legos ekzemple la artikolon de Dovra Soleo, vi certe havos iuspecan reagon antaŭ liaj ideoj. Se vi opinias ilin fanatikaj kaj neakcepteblaj, ne nur plendu ke tiaj stultajtoj aperas en la Bulteno, sed racie refutu ilin por ke aliaj ne same eraru. Se vi opinias, ke ili prezentas la solan vojon al la venko de Esperanto, pensu kaj verku pri tio, kion oni faru por realigi ilin. Eble el tia pensobolado oni trovos pli praktikan solvon - oni pri-pensu ekzemple la planon de Pola Esperanto-Junularo por tia lingva komunumo en Afriko ktp, ktp. Se vi iam instruis Esperanton, vi ne povos ne sperti ian reagon antaŭ la artikolo pri aŭdoparolaj instrumetodoj, kie staras kondamnitaj la metodoj ĝis nun uzitaj por la klasĉambra instruado de Esperanto.

Dum la pasintaj monatoj vere multego okazis en Usono por instigi nin al pluaj progresoj dum la nuna jaro. Nur kelkajn ekzemplojn mi donu: la Esperanto Eduka Centro ricevis pli ol 8000 informpetojn rezulte de informado en "This Week"; la Esperanta Inform-Centro (Novjorka Oficejo de ELNA) ricevis tuj poste centojn da informpetoj, inkluzive de konataj altranguloj, rezulte de artikolo distribuita de UPI al la landa gazetaro. Oni atingis la ankondukon de Esperanto vastskale en la lernejojn de San Mateo, Kalifornio, kaj inaŭguris kurson por instruistoj de Esperanto sub la aŭspicio de la ekstera fako de la Universitato de Kalifornio. Admirinda laboro estis farita por enkonduki Esperanton en la universitatojn, aparte fare de Ges-roj Shell en Berkeley, por aranĝi radiajn kaj televidajn programojn, kaj por subteni la klopodojn de UEA okaze de la nuna Jaro de Internacia Kunlaborado de la Unuigintaj Nacioj.

Por instigi ankaŭ vin pripensi kiujn projektojn ni celu realigi en la nuna jaro kaj en la baldaŭa estonteco, jen kelkaj el la plej urĝaj projektoj pri kiuj mi intencas okupiĝi kaj kunlabori. Oni konsiis al mi prilabori materialojn por programita lerneja kurso kun sonbendoj, kaj mi tiucele ekzamenos la eblecojn uzi ĉiujn plej modernajn instru-metodojn kaj helpilojn. Mi esperas pri multa kunlaboro flanko de instruistoj spertaj en la lernigo de Esperanto! Mi helpos al la kreado de malaltkosta disko-kurso de Esperanto, tiel urĝe bezonata. Ĉu ni havu tre bazan aferon kun koncentrita gramatiko kaj baza vortaro por vendado de \$1? Jen ebleco. Aŭ eble pli ambician por \$5? Sed ĉu aliaj ne jam prilaboras tian diskon? Por la venonta septembro la informilo "What Every Student Should Know about Esperanto" estos certe rehabebla por agado en lernejoj kaj universitatoj.

" D X "

Al la usona aŭtomobilistaro, la literparo "DX" signifas konatan benzinmarkon. Sed al internacia grupo de hobiistoj, "DX" estas la celo de sindediĉo postnoktmeza, foje ĝojiga, foje frustra kaj freneziga. En la mondo de radio, la litero "x" uziĝas kiel finaĵo de mallongigo de teknika termino, ekzemple rx por ricevilo, tx por elsendilo; dx, komence, estis la mallongigo por longdistanca ricevo, kaj nun iĝis tut-simple la nomo por tiu flankokupo, kies celo estas kapti kiel eble plej rarajn (ne necese forajn, sed ankaŭ mallongdistancajn, malaltpotenciajn aŭ malnovmodajn) radiostaciojn, dediĉatajn al publika aŭskultado enlande aŭ, ofte, eksterlande.

Per simpla mallongonda ricevilo, ĉi tie en Usono, facile eblas kapti Perth, en Okcidenta Aŭstralio, en bonegaj ricevokondiĉoj; ĉi tiu elsendilo estas fortpotenca, elsendas je konataj horoj en konataj frekvencoj, en angla lingvo. Sed kapti malaltpotencan, hispanlingvan elsendilon el sufiĉe apuda lando kiel Honduraso estas pli "dx-a" defio. Ĝi ne havos fiksitajn elsendhorojn, kaj, pro manko de kristala frekvenc-kontrolo, la uzata frekvenco ne restos konstanta, kaj eble tute ne akordos kun la ondlongo indikita en oficialaj listoj. Stacio, ekzemple, en Bolivio, eble funkcios tute sen permeso de la tiulanda registaro, kaj ne aperos en oficialaj gvidiloj al radioelsendado en tiu lando; ĝi ne estos poŝte atingebla, ĉar ĝi troviĝos en regiono de la lando, kiu ne estas en la manoj de la leĝa registaro. Sed ĝi estos aŭdebla en eksterlando, kaj la celo de la vera DX-isto estos, malkovri la faktojn pri ĝi, kontaktiĝi poŝte kun ĝi, kaj eble fine publikigi sufiĉe precizajn informojn pri ĝi en la pluraj internaciaj libroj kaj bultenoj dediĉitaj al ĉi tiu fako.

Sed mi komencu ĉekomence. Kutima usona hejma radioricevilo ĝenerale havas aŭ unu aŭ du frekvencbandojn. Se nur unu, plejofte estos la loka elsendbando kutime uzata en Nordameriko, la mezondo, plejparte konata en ĉi tiu lando kiel "AM", kvankam amplitud-modulacia elsendado eblas en ĉiuj bandoj, kaj la literoj "AM" tute ne rilatas al iu ajn fiksita frekvencbando. Tiu ĉi bando kovras la frekvencojn 540 ĝis 1600 kilocikloj; kaj la usonaj, kanadaj kaj meksikaj stacioj troviĝas en ĉiuj frekvencoj, kies lasta cifero estas 0, ekzemple en 540, 550 kaj 560. Inter ili, en 545, 555 kaj 565, kaj foje en ne-regulaj frekvencoj kiel 542, 557 kaj 569, bona, dividpova ricevilo povas ofte kapti centramerikajn, kaj, malpliofte, sudamerikajn staciojn. Bona ricevilo en la orientaj ŝtatoj ankaŭ kapablos, minimume dumvintre, kapti la eŭropajn elsendilojn, kiuj, kvankam ili elsendas en la sama

ondlongaro, uzas sistemon de naŭkilociklaj kanaloj, ekzemple 557, 566, 575, 584 kilocikloj. La rezulto de ĉi tiu sistemo estas, ke kvankam iuj frekvencoj en Nordameriko kaj Eŭropo (Afriko ankaŭ sekvas la eŭropan sistemon) estas precize samaj (ekz. 710, 800, 890, 980), aliaj eŭropaj kanaloj troviĝas meze inter la usonaj stacioj (ekz. 845-Roma, 935-Agadir, Maroko, 1205-Bordeaux). En la okcidentaj ŝtatoj, aŭstralaziaj kaj orientaziaj stacioj estas (oni emfazu, nur per bona ricevilo) aŭdeblaj, sed ties sistemo estas dekkilocikla, kaj oni devas serĉi frekvencon, liberan de usonaj stacioj; post noktomezo, ĉefe dimanĉnokte kiam la nordamerikaj stacioj kiuj kutime elsendas tutnokte ne elsendas - ĉar iliaj sendiloj estas kontrolataj - ja eblas trovi liberajn frekvencojn. Eĉ ĉi tie en Indiana, kiu, el radia vidpunkto, troviĝas en la orientaj ŝtatoj, mi kaptis unu aŭstralian stacion, 4RK, Rockhampton, Kvinslando, en 840 kilocikloj, post ĉeso de la elsendoj de nia loka stacio WHAS, Louisville, Ky., en tiu sama frekvenco. Sed oni komparu tiun solan aŭstralian ricevon kun la pli ol cent eŭropaj kaj afrikaj elsendiloj, kaptitaj ĉi tie en Bloomington, en la regiono 540-1600 Kc.

La alia bando, ĝenerale uzata en Usono por loka elsendado, estas la frekvenc-modulacia bando, en ondlongo de ĉirkaŭ 3 metroj, t.e. trealtfrekvenca bando de 100.000 kilocikloj (100 megacikloj) en sekundo. Kvankam ricevkondiĉoj nenormalaj povas multe plilongigi la kovrdistancon de FM-elsendilo, tio ĝenerale ne superas sesdek mejlojn, superakve eble cent mejlojn, variante laŭ la potenco, antendirekto, kaj alteco de la elsendilo. Multaj usonanoj konstruis la necesajn antenojn por igi el FM-aŭskultado interesa hobbio, sed ili kutime kaptas nur nordamerikajn staciojn, ĉefe anglalingvajn.

La plej taŭga bando por internacia komunikado estas kaj restas la mallongonda bando. Komencante per la ŝipaj kaj aer-komunikadaj bandoj en frekvencoj ĉe la altfrekvenca fino de la mezonda bando (pli ol 1600 Kc.), ĝi kovras la tropikajn disaŭdigajn bandojn, kaj finiĝas per aro da internaciaj elsendbandoj, kiuj estas plejparte uzataj de la granda kvanto da internaciaj radiostacioj - registaraj, komercaj, kaj religiaj - kiuj celas, ĉefe, aŭdantaron en eksterlando. Kvankam la precizaj frekvencoj interne de la bandoj estas kontrolataj en kilocikla mezuro, la ĝeneralaj nomoj de tiuj bandoj estas tradicie indikataj en metroj. La internaciaj bandoj estas tiuj de 11, 13, 16, 19, 25, 31, 41, 49, kaj 75 metroj. La tropikaj elsendbandoj estas 60, 90, kaj 120 metroj.

41 kaj 75 metroj ne estas uzataj por publikaj elsendoj el Nordameriko, sed multaj eŭropaj, afrikaj kaj aziaj stacioj estas bone aŭdeblaj tie. En "metrobando" estas sufiĉe multaj frekvencoj, ekzemple la 49-metrobando, la plej grava bando nunsezono por elsendado de Eŭropo al Nordameriko, konsistas en la frekvencoj 5955, 5960, 5965, ktp., ĝis 6195 Kc., fino de la oficiala bando. Multaj stacioj en iuj landoj, ekzemple Radio Pekino, ne aŭtomate elsendas interne de la bandoj, sed en la eksterbandaj regionoj, kiuj estas ankaŭ uzataj de telegrafaj, teletipaj, kaj aliaj nedisaŭdigaj stacioj.

Ricevkondiĉoj varias ege multe de sezono al sezono, kaj de horo al horo. Neniu frekvenco kiu estas taŭga por elsendo de Eŭropo al Nordameriko dumtage taŭgas ankaŭ nokte. Iuj regionoj, ekz. Japanujo, bonege aŭdiĝas je iuj horoj (nuntempe en Bloomington, ĉirkaŭ 1700 ĝis 1930 laŭ orientusona horsistemo, kaj denove de 0300 ĝis 1000 horoj), kaj tute ne je aliaj horoj. Por doni ekzemplon, mi menciuj la problemon de la Brita Radio, la BBC en Londono, koncerne elsendojn al Nordameriko. La nordamerika elsendoservo komenciĝas je la 1030 horo, orientusona horsistemo, kaj taŭgas la 19-metrobando (dumvintre); sed jam je 1100, 25 metroj estas ĝenerale pli taŭga frekvenco. Ĉirkaŭ 1300, oni komencu serĉi BBC en 31 metroj, kvankam 25 eble ankoraŭ taŭgos. Je 1500, eble 31 jam ne plu eblos, kaj oni devos serĉi BBC en 41 aŭ 49 metroj. Sed la bandon de 41 metroj, neuzatan por publika disaŭdigo en Ameriko, okupas amatoraj stacioj, kaj dumtage ne eblos kapti eksteramerikajn staciojn. Do taŭgos nur 49 metroj. Ĉirkaŭ 1730, la bruo de la amatoraj stacioj malplilaŭtiĝas, kaj oni povas resti en 41 metroj ĝis 1900, kiam tiu ondlongo iĝas tro mallonga por servo el okcidenta Eŭropo. Tiam 49 metroj estas la sola ebleco; kaj oni nur esperu, ke malgraŭ la granda amaso da eŭropaj stacioj kiuj scias, ke nur en ĉi tiu unu sola bando ili povas kapti usonajn aŭskultantojn, la bruo de la intereŭropa frekvenclukto ne estos tro laŭta. Je la 23a horo vespere, oni serĉu en la 75-metra bando, kiu ankaŭ estas en Ameriko amatora bando, sed kie la bruo pli aŭ malpli malaperos je tiu ĉi horo. Noktomezo en orienta Usono estas la kvina matene en Londono. Baldaŭ komenciĝos en Eŭropo nova tago. Oni iru al la 49-metrobando, kaj restu tie. Dumvintre ĉirkaŭ 0300, dumsomere antaŭe, la laŭteco de la Londona stacio malpligrandiĝos. Nun estas hela tago en Britujo, kaj la plej taŭgaj frekvencoj estus en la "dumtagaj" frekvencoj de 19 kaj 25 metroj, aŭ eĉ en 13 aŭ 16, kvankam tiuj bandoj ne estas multe uzataj nuntempe, pro manko de sunmakulaktiveco. Sed 19 kaj 25 metroj ne eblas por eŭropa ricevo en Usono je la 03a aŭ 4a horo matene, ĉar la nokto "mortigas" tiujn bandojn. Nur dum hela tago oni povas ricevi multe en .

ili. Do, Eŭropo ankaŭ havos periodon de plimalpia neaŭdebleco inter tiu horo kaj ĉirkaŭ la 7a matene; kaj, unu post la alia, la eŭropaj stacioj tiam revenos.

Problemon al la orientusonaj DX-istoj donas la azia kontinento. La plimulto de la aziaj stacioj devas transiri la nordan poluson, kaj pro manko de jonoj en la jonosferio de tiu regiono, kiam ili alvenas ĉi tien, la aziaj stacioj, speciale tiuj el la Azia kontinento (Japanujo, Indonezio, ktp. ne estas tiel grave influitaj) varias multe kaj rapide en laŭteco. Ne estas ĉiam facile kompreni la programojn de tiuj stacioj, kvankam de tempo al tempo mi multe ĝuis programon de Radio Cejlono, Radio Pakistano, kaj aliaj.

Mi povis en la nuna mallonga artikolo doni nur rapidan skizon pri la eblecoj malfermitaj al la serioza radio-aŭskultanto. Mi invitas tiujn, kiuj interesiĝas pri membreco en klubo dediĉita al ĉi tiu hobia, skribi al mi ĉe - Richard E. Wood.
American Central Radio Club, 207 East 16th, Bloomington, Ind. 47403.

~ ~ ~ ~ ~

Noto de la redaktoro:

Allan Fineberg jam atentigis en la JEN-Bulteno ("Radio kiel Senesperigilo") pri la ŝajne diabla spirito kiu malhelpas ke la usonanoj aŭskultu al Esperantlingvaj radioelsendoj. Ekzistas eblecoj pri tio, kvankam la afero ja estas malfacila. Se tio interesas al vi, skribu al Richard aŭ petu pluan artikolon de li pri tiu temo. La horoj de la novaj elsendoj de Radio Pekin ne estas neblaj por usonaj aŭskultantoj - kiu aŭdos ilin unue? Nepre skribu al Richard kun viaj raportoj pri ricevo de Esperantlingvaj programoj! Parenteze pri tiuj programoj de Radio Pekin, kiu alia antaŭ kelkaj semajnoj aŭdis dum usona tutnacia novaĵelsendo la anoncon, ke "Red China started pumping out its propaganda in yet another language today - it's Esperanto, an artificial language based on phonetic principles..." Hodiaŭ oni eĉ ne devas serĉi por la informado pri Esperanto, ĉu ne vere?

#####

"Translating Foreign Language into Careers" estas baza gvidlibro eldonita de la Indiana Language Program por studentoj kiuj deziras uzi fremdajn lingvojn studitajn en la lernejo kaj en la universitato en sia estonta kariero. Bazita sur la premiso, ke "The American businessman, professional or government employee who wants a deeper understanding of what is happening in and to our world must be able to speak more than English", ĝi enhavas interesajn statistikojn pri la uzado de fremdaj lingvoj en Usono.



"Kaj mi diris al D-ro Lapenna, ke ni almenaŭ portas vestojn,
kaj ke se UEA ne rekonos la Internacian Asocion de Vagabondaj
Sentaŭguloj, mi tuj nuligos mian abonon al la dokumentoj de CED!"

ESPERANTO - NACIA LINGVO?

Nia dilemo

"La nombro de la entuziasmuloj atingos certan ciferon kaj haltos, kaj la malvarma indiferenta mondo ne volos oferi sian tempon por tio, ke ĝi povu komunikiĝadi kun tiuj ĉi nemultaj."

(Zamenhof, "Unua Libro, 1877.")

"Estas certe ke la esperanta temo ĝis nun restis malliberigata de fermita rondo: oni ne lernis Esperanton, ĉar oni ne havis okazojn ĝin uzi, ĉar oni ne estis lerninta ĝin."

("Esperanto Internacia", aprilo 1937.)

Ekster-sociaj homoj

Troviĝas en Dovro kompatinduloj vivantaj ekster la normala socio, senlabore, senmone, sendome, senespere, parolante al neniu, eĉ ne unu al alia. Foje dum la severa vintro de 1962-63, reveninte noktomeze de Dartford-a E-Klubo, mi renkontis sur Dovra neĝumita strato vagulon malpuran, ĉifone vestitan, kun barbo taŭzita. Per rudimentaj silaboj li demandis angle, "Lit-dorm'?"

Hazarde ni staris preskaŭ ĉe la policejo, kien mi lin direktis, kien sub la blua lumeto li malaperis. "Bone," mi pensis, "oni lin kondukos al la senhejmulejo de la Sav-Armeo." La postan matenon oni lin trovis en la parko, pendantan de arbo. Se mi estus dirinta, "Frakasu la vitrinon de tiu butikoj," supozante ke li komprenus kaj obeus, li ne nur vivus ankoraŭ, sed kuŝadus sur relative komforta lito.

Kiuj estas tiuj ĉi modernaj vagabondoj, loĝantaj en kazematoj aŭ kavernetoj de la blankaj klifoj de Albiono, vivantaj de krustaĉoj el rubujoj? Ili estas Poloj, Hungaroj, kiujn pro diversaj kaŭzoj oni neniam sukcesis britigi, sed kredeble ankaŭ sen pola aŭ hungara nacieco. Ili povas nur sopire-suspire rigardi jen kaj jen la klifojn de Francujo, de kie estus eble marŝi hejmen! Sed eĉ tie ili ne estus en pli bona kazo, tion ili kutimiĝis al fiero, memrespekta sendependeco. Tamen ili suferas!

Ĉu vi iam legis pri Pastro Borelli, kiu dormis surstrate kun la junaj bubaĉoj senhejmaj de Napolo por ilin ekkompreni kaj fine konduki en sian "Domon de Bubaĉoj"? Aŭskultu, ĝuste tion mi volus fari por la Dovraj vaguloj! Sed mi bezonas helpon de kelkaj esperantistoj, en Dovro mem. Ili devos esti pretaj disponigi eksemple ĝardenan kabanon aŭ eksteran remizon por la vintraj noktoj, kaj ankaŭ KOLEKTIVE akcepti respondecon por la eventualo ke unu el niaj vaguloj eble ŝtelos ion de la najbaroj.

Se ni sukcesos iom post iom anime, anonime, kontaktiĝi kun ili, ni parolos nur en Esperanto. Per Esperanto, ili surprenos IDENTECON, la cementon kiu ilin ligos socie unu al alia, sen minaco denove ilin liveri al la ortodoksaj bonfarantoj kiuj pensas nur, "Donu nutraĵon, vestojn, domojn, laboron," sen pripensi la spiritajn bezonojn de mizeruloj. Poste ni aĉetos domon, starigos INTERNAN industrion kaj invitos aliajn esperantistojn aliĝi, ankaŭ alispecajn malfeliĉulojn kiuj kredeble profitos nian komunumon.

La rezulto estos kvazaŭ nacia Esperantujo! Nur flanke la projekto rezultigos finan venkon de Esperanto. Ĉu, juna homo, tio vin interesas pli ol historio pri mizeruloj aŭ enloĝigo de Dovro pere de movadaj veteranoj kiel nukleo de E-Civito? Vi eble timas, ke la publiko nin bildigos kiel rason de sentaŭguloj kaj kadukuloj, dum fakte (kiel ni mem honeste konscias) ni estas raso de epikuranaj egoistoj profitantaj la majstroverkon de Zamenhof por nin distri eble unu fojon ĉiusemajne per ĝuado de etaj vivo-voluptoj. La severa vero estas ke, kvankam nia lingvo utilas kiel amuzilo, neniu serioza realisto ĝin alprenas, ĜUSTE ĈAR ĜI ESTAS NENIES UNUA LINGVO. Ni frontu al tio, ke Esperantujo ne ekzistas; ni propagandas metaforon.


Tamen ekzistas homoj kiuj bezonas tian neŭtralan interlandon. Ili fariĝu elito de la movado, gento kun unika privilegio uzi Esperanton kiel UNUAN lingvon.

Socia bazo


"Por ilustrati la falsan premison, ke esperantista popola kulturo povas ekzisti sen ĉirkaŭanta ĝin nacia Esperantujo, ni prenu kiel ekzemplon figurojn el la cetero tre bona infanlibro "Amuzo per Scienco." Sur paĝo 33, Christine faras tubojn el ĵurnalo, sur kiu estas facile legebla "Is this you?". Sur paĝo 87 ŝi prenas sodon el paketo markita, "Washing Soda Crystals - Outstanding Value." Nu kompreneble ke ne penvaloras fari specialajn kliŝojn por tubo farita el "Heroldo," kaj sodo farita speciale por kongresa uzo, sed oni ne dubas ke la infanoj, ankaŭ ekster Anglujo, faras la eksperimentojn nacilingve. Ĉiuj aktivecoj de nia komune homa vivo devos finfine disvolviĝi sur ĝusta fono, kun stratnomoj, radio- kaj televido-programoj, edukado kaj vivtenado tute en Esperanto, antaŭ ol la vasta publiko serioze traktos kun ni, ĉar ankaŭ ĝi estas realisma, kaj pli ol unu ne-esperantisto scivolis, kial ni ne starigas propran landon."

(D.Soleo, "Amboso Tintanta", 1964.)


(--Vidu ilustraĵojn aliflanke...



FERMITA RONDO



ELIRO - UNUA ORBITO



SPIRALE FOR!

D-ro Mizantropo.....

ZAMENA HOFILO

(el "Kial Ne?")

Juna amiko mia, kiu ĵus partoprenis en la kongresoj en Nederlando, informas min ke multaj alilandanoj tie ne povis kredi ke li efektive estas Anglo, ĉar li parolas Esperanton sen nacia akcento. Finfine li devis komenci ĉiun konversacion per "Mij ejstaas ejl Angleŭjōŭ - ejl kijeŭ landoŭ ejstaas vij?" Tiam, dum la daŭro de la konversacio, li ne-rimarkeble reiris iom post iom al la ĝusta prononco, tiel evitinte la neceson montri kiel pruvon aŭ sian pasporton aŭ sian longan subpantalanon.

Sed la problemo mem estas neniel nova. Mi bone memoras, ke dum tre frua Universala Kongreso mi spertis, ke kvankam en ĉiu horo mi faris la demandon "El kiu lando vi estas" al meze dudek homoj, tamen neniuj faris saman demandon al mi. Post iom da tempo mi ekkomprenis ke mia sufiĉe forta angla akcento igis tian demandon nenecesa. Kiam, do, mi eniris kafejon por aĉeti botelon da lunĉo, kaj vidis ke estas ĉe unu tablo unu vaka seĝo kaj du sinjoroj portantaj verdajn stelojn, mi alproksimiĝis al ili kaj demandis per forta germana akcento:

"Ĉu ebl' vi p'rmes's, k' mi s'diĝu tj' ĉi?"

"Jeŝ, kompr'njeblje" respondis unu.

"Vi istas Ŝe nja tablo tĥe bovena" aldonis la alia.

Mi do sidiĝis, kaj dum la kelnero forestis mi rigardis miajn samtablanojn dum kelkaj momentoj, kaj tiam diris:

"P'donu, s'njoroj, mi'n s'v'lem'n, sed de vĵaj vizaĝoj mi d'venas k' vi est's fratoj."

"Vĵi pravasĵ" respondis la unua sinjoro.

"Pro kĵo, do," mi daŭrigis "Vi hav's rus'n 'kzentn dum vĵa frato hav's franc'n?"

"Eĵfektiveĵ" li respondis, "Nĵij ejstaas Angloj, seĵd nĵij paroŭliĵs tieĵl por keĵ vij nej sciuoŭ tĵioŭn!"

Dum mi klarigis al ili, ke ankaŭ mi per sama ruzajo estis klopodinta ilin trompi, mi rimarkis, ke malgranda sinjoro ĉe apuda tablo tiel konvulsias pro silenta ridado, ke li devas formeti la okulvitrojn por viŝi siajn larmantajn okulojn. Rimarkinte, ke mi lin rigardas, li venis al nia tablo kaj diris:

"Pardonu min, samideanoj, sed mi senintence aŭdis vian konversacion, kiu tiel amuzis min ke ne ridi mi ne povis."

"Ne pardoninde, amiko," mi respondis. "Sed mi rimarkis, ke ankaŭ vi tre strange parolas Esperanton. Ĉu eble vi estas Anglo, kaj faras samon kiel ni?" "Ne, tute ne," li diris, ankoraŭ ridegante.

"El kie, do?" mi pludemandis. "Mi venas el Bjalistoko," respondis la sinjoro, reordigante sian grizan barbon

ZVILGULBO

Hieraŭ, ĉe la Lindona Esperanto Klurbo, mi perolis kun Prof. Purlonna. Erliverte, mi hervis seriozan diskurton kun li pri la termo ke ni erĝe berzonars plerajn novajn vertojn en nia lingver. D-ro Purlonna komprenerble nejis tion asertante ke jam estars tro multaj vertoj en la lingvo. Mi kontraŭhis tion derante ke sen vortoj por ekzermple "slurdlo" kaj "vimbiko" aŭ "Nogzliketo", kiel ajn pro la dierblo ni pervus preparerli Zvilgulbon? La D-ro kolere elkrarĉis ke oni ne dervus parerli pri tiaj aferoj; estars ĉiam la sarma ĉe la junuloj hodiaŭ, ili pensas pri nenio krom Zvilgulbo -- ili estas efektive joniemuloj - aŭ almenaŭ unu duono tiel pernsas -- la aliaj suferas de lingamito! Mi lerte atentigis lin pri la ĵusa karzo de Kilin Krister kaj la Milit-ministero, "Oni vere bezonas ion da slindoj en la verovo," kaj malofta Hikimbo en la lurdiko estas tolereble kiel diris Marjerton Boulterie "Kondirĉe ke oni temas la kurtetojn!"

"Vi ne krerdu tion" diris nia eks-prerzidarnto, S-ro Holmi Harres, "La brerta cernro por eksterlandaj aferoj havas grandergan dokumentaron pri la faroj de la perversaj Esperantistoj," (S-ro Harres kirlis sian teon per la mufta kapo de sia geĉo). "Mej mermoras kiam mi erstis en la ŝilikoficejo, mia erstro vernis al mej, kaj deris ke aferoj ja ne plibonerĝas". Erntaŭ ol li pervis derigi, S-ro Ŝilperorf lin interompis, "Ŝernis el mej ke kierm temas pri litoj de merlbohna kvahlito oni nerpre berzonahs klubiĝekojn por emfarzi la efumadon de personoj kierl S-ro Furguff..". Sed bedoŭrinde S-ri Furguff estere aŭskultinta, "Ej, sej ne ĝejnars al vi ni olduloloj estas jam konintaj la kara lingvo doom pli ol tridek jaroj - kaj post tiom da jaroj ni estas aŭ spertloj aŭ stultoloj, ĉu nej? Kaj mia edzino estis Budhista monaĥo antaŭ ŝi ŝanĝis la sekso..." Sed bedarundi junulo S-ro Myan Brun lin interim per korigado "Ŝajnus al mi sinjere, ker vi dierble feris ereron pri la akervizop kaj laŭ la Plingaj Responzop eldonita de 'Aŝet' "a Paris" origilane Ŭerkita de Mazonhop en mil sescent okdek flop, oni ĉiam post ol, en la kadri da, kiel antaŭ-menciita, estas jene menso-klare evidente erariĝinta".

Je tiu momente, feliĉe envenis en la ĉambron, nia kara Prezidanto "Long Ĝon Orson-Bells" (tiel nomata ĉar lia Patro sonor-igas ilin en Burton-on-Trent). Per sia kutina diplomervo li lerte kaj ĝenitale ĉesigis la paroladotojn kaj stiris laktsedukton en kanalo de pli interesa temo. "Gesinjoroj, ni nun decidu unuanime kion fari pri eh hum vi scias kiu, kaj kiel elĵeti lin el la Centra

Oficejo ĉe 140, Holland Stark Avenue, ĉar finfine nia mavdodo jam sufiĉe suferis de la fanatikaĵoj de tiu kaj ties politikaj opinioj. Tiam starigis D-ro Purlonna, forbatis la cindrojn de sia cigaredingo kaj citis paĝon 268 el sia fama libro 'Fekoliko' ..Esurs tiam ke ni ĉiuj konstatis ke nia malnova kaj mal-jun-a samidemano ne estis ĉesinta daŭre klaĉi pri la reguloj kaj pri la kutimoj de la afero." Li alĝustigis siajn okulvitrojn kaj diris kun duon-bulko en la angulo de sia buŝo, kaj sufiĉe sovaĝa silobo sur sia ĉeklibro. "Tiel certe ke mia nomo estas Mallen-Skviff, mi avertas vin ke D-ro Sarkassi estas komunismo en direkta interligo kun tiuj kiujn ni ne rajtas mencii ĉi-tie kaj se li ne silentas tuj ni morgaŭ malsakros lian sinagohon!"

Ha geumantoj, ĉi-tiel kiel ĉiam finiĝis tre interesa forumo ĉe la Lindona Klubo. Ĉi-foje ne necesis voki Herson, ĉar neniu kadavriĝis eŭ eĉ bumfis alian sed eventualajn rezultojn dela apartigo de gehufemuloj en 'Modoj kaj Rokeroj' ni eble sciigos baldaŭ - ne necesas raporti ke Mallen-Skviff malaprobas ambaŭ sandviĉojn.

Pacifisto

(represita el "Kial Ne?")

#####

A Ŭ S K U L T U ! -

THE BEATLES

Estas kredeble, ke inter la 1.000.000.000 da loĝantoj sur la Tero estas unu, kiu neniam aŭdis pri la brita modkantista grupo, pri kiu temas ĉi tiu artikolo. Eble tro optimisme estas, esperi ke tiu unika homo troviĝas inter la iom-malpli-ol 2.000.000.000 da loĝantoj, kiujn havas nia gazeto, sed se jes legu atente mi petas, ho estimata samideano, mi verkas ekskluzive por vi!

The Beatles, do. Nomi ilin modkantistoj apenaŭ adekvatas -- muzikistoj, komponistoj, filmaktoroj -- eĉ, laŭ unu grava ĵurnalo angla, ambasadoroj! -- iliaj multflanka talento kaj ĉiam bonhumora spriteco kaptis la atenton kaj admiron ne nur de knabinoj ĉie, sed ankaŭ de ties patroj kaj patrinoj, de mondkonataj distristoj, eĉ de parlamentaj ministroj - kaj aparte de ties edzinoj! Foje ŝajnas, ke ilin amas la tuta mondo.

Laŭ vidpunkto de muzikiloj, la konsisto de la grupo estas tradicia --- tri gitaroj plus tamburoj. Ĉefgitaron ludas George Harrison kiu, paradokse, estas malplej konata el la kvar, eble pro tio, ke basgitaristo Paul McCartney kaj ritmogitaristo John Lennon (sola

edzo de la grupo) estas aparte famaj pro siaj multaj komponaĵoj -- interalie "World Without Love" (Mondo sen Amo) per kio sukcesegis en multaj landoj alia kantista duopo, Peter and Gordon -- dum tamburisto Ringo Starr, kiun eĉ la patrino apenaŭ nomus bela, estas de multaj junulinoj plejamata pro siaj duontristaj ridetoj kaj lakone filozofaj diroj.

Ĉiuj kvar hejmas en Liverpool, kaj pri tio multe fieras. Ĝuinte iom da sukceso en la propra urbo ili iris al Hamburgo (Germanujo) kie ili akompanis kantiston Tony Sheridan, kaj kun li registris kelkajn diskojn, kaj muzikis en la hamburgaj noktokluboĵ. Estis tamen nur post apero de ilia disko "Love Me Do" (Nepre Min Amu) ke The Beatles iĝis konataj de la brita publiko, kaj dua disko "Please Please Me" (Bonvolu Min Plaĉi) estis tuja kaj grandioza sukceso. De post tiam, por niaj talentaj anikoj el Liverpool triumfon sekvis triumfo, kaj en Britujo kaj en aliaj landoj.

En kiuj rilatoj, oni rajtas demandi, estas ilia muziko tiel eksterordinara? Kiel ofte ĉe preskaŭgenia talento estas facile analizi sed malfacile trafe imiti. Ili uzas por siaj kantoj simplajn, laŭvivajn temojn, kaj esprimas ilin per kurtaj, emociigaj vortoj; ili kreas ritmojn kaj melodiojn kiuj parkeriĝas preskaŭ ekstervole; al tiuj ili aldonas harmoniojn kiuj, kiel fluoreska farbo ĉe desegnaĵo, buntigas kaj vivigas. Sed en iu senco la fin-produkto, ĉu publike prezentata, ĉu diske registrita, estas pli ol la sumo de siaj partoj. Ĝi estas, por multaj gejunuloj, emocia sperto, jen ĝoja, jen trista, sed ĉiam reala. Pli ol la edukistoj, la sociologoj, kaj la psikiatroj, The Beatles komprenas kiel funkcias la juna menso. Jen, eble, la sekreto de ilia sukceso.

(el "Kial Ne?")

T.G. Page

DEZIRAS KORESPONDI.....

Kara aniko:

Ĉu vi povas doni al ni grandan plezuron?

Ni ĉian deziras korespondi kun esperantisto de via ĉarma lando.

Ni estas geesperantistoj kaj frate kunaj ni skribas al niaj eksterlandaj geamikoj. Almir kaj Zilda estas niaj nomoj.

Nia adreso estas:

Almir Ferreira

Caixa Postal 18-Esperanto

Rio de Janeiro ZC - 00, Brazilo.

Permesu al ni kredi ke esperantistoj estas ĉiam amikaj - kaj

skribu tuj afable al viaj malamikoj.

LA AŬDO-PAROLA METODO DE LINGVO-INSTRUADO KAJ TIES APLIKO AL ESPERANTO

Dum la pasintaj kelkaj jaroj ekestis aparte en Usono aktiva konscio pri la fakto, ke la malnovmodaj metodoj de lingvo-instruado estas tro arkaikaj kaj rezulto-mankaj por esti plu tolerataj. La realiĝo de tiu firma konvinko troviĝas en la forta subteno de la aŭdo-parola sistemo flanke de la influhava "Modern Languages Association of America" (MLA) kaj de la usona registaro pere de ties NDEA-Institutoj por la edukado kaj reedukado de lingvo-instruistoj. Necesas instrui lingvon kiel komunikilon por ebligi aktivan kontakton kun la parolantoj kaj verkistoj de tiu lingvo. Jen la defio kaj la celo.

Por la lernantoj de Esperanto ekzistas eĉ ne unu libro kiu respondas al la postuloj de la nun oficiale subtenataj instrumentoj uzataj en Usono por la lernado de fremdaj lingvoj. Ĉu ankaŭ por Esperanto ni bezonas ĝisdatigi niajn ideojn? Kiom urĝe necesas havigi al la anglalingva instruistaro bazan lernolibron kaj materialojn por plene eluzi la avantaĝojn de la aŭdoparola metodo ankaŭ por la lernantoj de Esperanto?

Mi en ĉi tiu artikolo ne deziras ekzameni kiom pli oni povas fari en la instruado de Esperanto ol en la instruado de aliaj lingvoj. Pri tio multaj instruistoj de Esperanto povas atesti el propra sperto, kaj S-ro Markarian en sia raporto al la Beograda Lerneja Konferenco koncerne aktivajn metodojn de Esperanto-instruado jam tre bone skizis multajn el la tiuspecaj eblecoj. Mi pritraktos nur la teoriojn de la "nova skolo" kaj rilatigos ilin al la instruado de Esperanto. Espereble aktivaj Esperanto-instruistoj povos fari pluajn studojn, tiel ke iliaj kolegoj povos plene ekspluati la progresojn ĉiutage faratajn en la instruado de fremdaj lingvoj ĝenerale - la instruistoj de Esperanto nepre marŝu en la avangardo!

Ĝis la nuna jardeko la du ĉefe akceptitaj metodoj de lingvo-instruado en la usonaj lernejoj estis la jenaj: la gramatika-tradukada metodo, bazita sur la parkerigo de gramatikaj reguloj kaj tradukado en kaj el la lernata lingvo; kaj la rekta metodo, kiu, por iom troigi la bildon, instruas per la principo ke se oni faligas tra la plafono en la klasĉambrom nacian parolanton de iu lingvo kaj paroligas lin sufiĉe longe antaŭ klaso, la klaso fine komprenos lin kaj lernos la lingvon.

La du ĉefe kritikoj allaseblaj kontraŭ tiuj metodoj estas, unue, ke per gramatika-tradukada metodo oni neniam akiras aktivan scion de la lingvo, tiel ke ofte okazis ke eĉ post pluraj jaroj da studado la

lernantoj tute ne kapablis paroli ĝin. Due, pro la neorganiziteco de la rekta metodo (en la senco, ke oni komencas uzante klasĉambrajn objektojn kaj komplikajn lingvoformojn) lernantoj ofte akiras tro nebulan ideon pri la gramatiko kaj strukturo de la lingvo; kaj krome, la plensukceso de tia metodo dependas de genia instruisto (kiom ofte ni aŭdis, ke la rekta metodo de Esperanto-instruado estas bonega, sed ke nur S-ro Cseh povas instrui ĝin...?)

La gramatika-tradukada metodo baziĝas sur la sama principo, kiu tradicie uziĝis por la instruado de la klasikaj lingvoj, t.e. latina kaj greka. Tre malmultaj instruistoj havas antaŭ si la celdevizon "Post du jaroj en mia klaso vi parolos kiel Romano", kaj tute nature, ĉar kiu deziras paroli lingvon de ne-ekzistanta popolo, kiam ekzistas ĝis aŭ eble pli ol 5000 efektive uzataj lingvoj en la mondo? Oni povus do pravigi tian metodon por lerni la latinan, kvankam estas fakto, ke multaj lernis tre lerte traduki en la propran nacian lingvon kaj en la latinan ne haviginte al ŝi la elementan kapablon flue legi kaj kompreni skribitan tekston de latinlingva aŭtoro.

La rekta metodo baziĝas sur la principo, se mi rajtas uzi la vortojn de S-ro Cseh, ke oni devas ensorbi lingvon kiel la patrinan lakton. Grava kritiko tuj evidentiĝas. Dua lingvo ne estas la sama afero kiel la unua. Tiun oni lernas el absoluta bezono de komunikado. La duan oni lernas plejofte sen tiu urĝa bezono, kaj kiam pensokutimoj jam aŭtomate funkcias en la kadro de la strukturo de la unue lernita lingvo. Pro tio la lernanto de nova lingvo devas konstante lukti kontraŭ la lingvokutimoj jam fiksitaj en lia reag-sistemo. Por esprimiĝi en la lernata lingvo, li uzos la strukturon de la propra se li provos libere paroli - kaj liaj tro nesentemaj oreloj aŭdos en la nova lingvo ne precize difinitajn, malsamajn sonojn, sed sonojn kiujn li egaligis kun la plej proksimaj en la propra lingvo. Tiu fakto negative influos lian elparolon ĉar li ne povos eldiri kion li ne povas aŭdi.

Kiel povos la eltrovoj de la lingvistiko helpi al ni eviti la supre menciitajn problemojn? Ne estas adekvata spaco en la limoj de ĉi tia artikolo por pritrakti ĉiujn diskutindajn punktojn, sed mi deziras montri almenaŭ la ĉefan principaron de la aŭĉparola metodo.

La ĉefa postulo de la aŭdo-parola metodo estas tio, ke la lernado de lingvo baziĝas sur la kvar flankoj de lingva kapablo:


1) aŭskultado kaj komprenado: 2) parolado: 3) legado: 4) skribado. Tiujn kapablojn lernas ĉiuj infanoj en tiu sinsekva ordo, kaj tiuj instruistoj, kiuj komencas per la legado kaj skribado, kaj nur poste faras ian malfortan strebon por konversacii, ignoras la fakton ke lingvo estas unue ilo de buŝa komunikado. La skribsistemo tre malperfekte (kvankam ne tiom en Esperanto!) reprezentas kion ni parolas, kaj en la plimulto de la lingvoj de la mondo ĝi simple ne ekzistas.

Ĝis tiu punkto, konsentite kun la rektmetodaj instruistoj. Tamen - la lernantoj de dua lingvo estas kutime iom intelekto matura personoj, kaj se oni traktas ilin lingve kiel nurajn infanojn, oni kaj riskas ofendi ilin, kaj intence neglektas tiujn kvalitojn de ilia matureco kiuj plifaciligas la lernadon de fremda lingvo. La ĉefa obstaklo al la rapida ekregado de dua lingvo estas la jam fiksitaj lingvo-kutimoj. Tion forgesas la rekta metodo - oni povas uzi nur duan lingvon en klaso kiom ajn oni deziras, sed tio ne en si mem malhelpas, ke la lernanto influigu de malĝusta konscia aŭ subkonscia analogio kun sia unua lingvo. La ĉefa helpo al la lernado de fremda lingvo estas la fakto, ke intelekto matura persono povas rapide percepti strukturajn diferencojn inter du lingvosistemoj kiam oni tiajn indikas al li. Tion ankaŭ forgesas la rekta metodo.

Kiel profitas la aŭdoparola metodo de tiuj faktoj? Ni ekzamenu kelkajn el la klasĉambraj metodoj uzataj tiucele.

Unue, prononcado. La ekesperantisto usona kiu lernas legante, aŭtomate uzas usonan 'r' kiam li prononcas la 'r' en la vorto 'fremda'. Lia prononco estus multe pli korekta se li dirus anstataŭe 'fdemdan'! Fonetike sperta instruisto povas imiti la prononcon de la lernanto, kaj per modelo montri al li kiel lia prononco diferencas de la celata prononco. Poste, li povas priskribi la pozicion de la diversaj buŝ-organoj necesan por reprodukti ĝin. Post tio, la lernanto bezonas nur praktikadon, ĉiam laŭvoĉe kaj eventuale kun spegulo. Esperanto havas nenian sonon, kiun oni ne povas sukcese instrui tiumaniere al meza usona studento. La hispana lingvo havas preskaŭ ĉiujn t.n. 'malfacilajn' sonojn de Esperanto, kaj laŭ propra sperto la sola vera malfacilaĵo en tiu lingvo estas la pluroble ruligita "rr" sono, kiun oni ne povas tre adekvate priskribi. Por tiaj sonoj kaj por maljunaj lernantoj, konscia kaj konstanta imitado de la instruisto kaj multe da praktikado estas la sola maniero venki la obstaklojn. Sed ili estas kutime venkeblaj.

Due, strukturo. La malnovaj metodoj, emfazante tradukadon, kaŭzis ke la lernata lingvo dependu de la jam lernita. Vera



"Mi lomi timas pri mia plano por armeo da Esperanto-trudantaj robotoj -
Kiam mi kreis lin, lia unua vorto estis 'Ido!'."

dulingvismo estus neniam atingebla se oni farus nur tion. Malmultaj vortoj korespondas 100% al la signifo de vorto en alia lingvo, kaj por plene ekregi la strukturon de lingvo, necesas ne ke oni konsideru vortojn ekvivalentoj al tiuj de la unua lingvo, sed ke oni povu uzi ĉiujn lernatajn vortojn en kunteksto. Oni ne lernu "plaĉi"- "to like", sed oni lernu "tio plaĉas al mi" kaj sciu ke la frazo reprezentas la saman ideon kiel "I like that" en la angla lingvo. Oni parkerigu ne vortlistojn kaj gramatikajn regulojn, sed dialogojn, tiel ke oni lernu la vortaron kaj strukturon de lingvo laŭ la kunteksto de ties ĉiutaga uzado. La dialogoj prezentu la plej oftajn vortojn kaj strukturojn de la parolata lingvo. La vort-trezoro por tio kutime multe diferencas de vortkalkulo bazita sur la skribita aŭ literatura lingvo, do zorga kompilado estas nepre antaŭkondiĉo de uzebla lernolibro.

Ni reiru al la ekzemplo de "plaĉas al mi...". Post lernado de la frazo en sia kunteksto, la instruisto povus tre rapide atentigi pri tio, ke laŭ la strukturo de Esperanto oni uzas tiun formon, kiu estas laŭvorte ekvivalenta al "pleases me" en la angla. Li ne plu klarigu! Li tiam tuj ekzercigu la lernantojn tiamaniere:

"La pomo plaĉas al mi" (La klaso ripetas). "La oranĝo" (individua studento diras "la oranĝo plaĉas al mi" kaj la klaso ripetas). La instruisto aldonu sinsekve la nomojn de pluraj konataj objektoj, kaj en tiu kazo ankaŭ agoj se li deziras, "skiado plaĉas al mi" k.s. Li pluraligu la substantivojn kaj ŝanĝu la vortordon (ekz., "Plaĉas al mi oranĝoj"). Post sufiĉa praktiko, tiu lingva kutimo estos sufiĉe firma por ke la lernanto aŭtomate evitu la monstran formon, "Plaĉas al mi la pomon". Estas pruveble, ke ĝuste ĉe la lernado de tiaj 'problemoj' kiel la uzo de la akuzativo en Esperanto, la aŭdoparola metodo estas tre supera al aliaj. KREDU MIN, la uzo de la akuzativo estas nenio sterne malfacila kompare kun kelkaj aliaj problemoj kiujn frontas la instruisto de la hispana aŭ de kiu ajn alia nacia lingvo! Lingvon oni regas kiam oni ne plu devas pensi pri kiel oni diru ion, sed nur pri la enhavo, kion oni diru. Mi donu alian ekzemplon por montri, kiel la aŭdoparola metodo atingus la subkonscian aŭtomatigon de la akuzativo. "Hodiaŭ mi parolas Esperanton". Oni praktiku la frazon kun diversaj elementoj, "vi", "la lernantoj", "ili", "la instruisto" k.s. Oni ŝanĝu al "Hieraŭ...", "Morgaŭ...", tiel ke la lernantoj fiksas sian atenton sur la necesaj ŝanĝoj, kaj tute ne konscias ke la instruisto per tiu ekzerco celas lernigi al ili la uzon de la akuzativo! Tamen malmultaj el tiuj lernantoj en postaj okazoj informos vin, ke "Mi parolas Esperanto"!

En la klasĉambro oni aŭdu kaj parolu la lernatan lingvon, se eble pli ol 90% de la disponebla tempo. Kaj la ceterajn minutojn en la nacia lingvo? Se necese, por doni kiel eble plej koncizajn informojn pri la strukturo kaj gramatiko de la lingvo, montrante en kiuj rilatoj la lernata lingvo diferencas de la unua lingvo. Tia klarigo ne estas por argumenti kun la lernantoj, kial oni diras tion aŭ alian, sed nur por montri, kiel oni diras ĝin. (Aparte grava konsilo por instruistoj de Esperanto, kvankam estas ĝenerale facile montri la superan logikecon de difinita Esperanta formo kompare kun tiu de nacia lingvo). En la instruado de Esperanto, oni povus uzi la nacian lingvon eĉ malpli ofte ol ĝenerale eblas, sed oni memoru ke ofte unu minuto da anglalingva klarigado evitos longan tempon da konfuzo, da Esperantlingvaj klarigoj, aŭ da demandoj de la lernantoj. Oni ne deziras havi nekontentajn, nekomprenintajn studentojn: ili ne parolu en sia nacia lingvo, do oni ne donu al ili la okazon per fuŝa aŭ tro komplika klarigo.

Grava aspekto de la aŭdoparola metodo estas tio, ke la lernantoj ek de la unua tago aŭdu la lingvon je normala konversacia rapideco. Se la instruisto haltas post ĉiu eldirita vorto kaj tiel instruas artefaritan kripligitan formon de la lingvo, neniam aŭdatan ekster la klasĉambro, liaj lernantoj sentos sin tre sekuraj ĝis ili provos komunikiĝi kun parolanto de tiu lingvo. Konstatinte ke ili povas nek kompreni, nek adekvate komprenigi sin, ili tute grave rajtos aserti, ke la instruisto trompis ilin. Mi havas kolegon el Kubo kiu kiam li instruas klason de komencantoj pri la hispana lingvo, parolas ĝin eĉ pli rapide ol li normale tion farus. Rezulte liaj lernantoj estas inter la plej kontentaj de la kurso pri sia progreso, kaj havos neniajn komunikajn malfacilaĵojn se ili post unu-du jaroj deziras ĝin aktive uzi. Postuli de niaj spertaj Esperantistaj oratoroj ke ili parolu malpli rapide "pro la komencantoj", kaj plendi pri diktatoreco kiam ili respondas ke oni aŭdu pli rapide, estas mokado pri la tuta koncepto de lingvo kiel komunikilo kaj riskas meti Esperanton en lingvistike ridindan pozicion. Malgraŭ tio ke tre malmultaj aktivaj Esperantistoj lernis la lingvon kiam ili estis junaj lernejanaroj, ni povas jam multon fari por ekzemple forigi la grandan senton de malsupereco kiun sentas lerneje instruataj infanoj ĉe la Infan-Kongresoj kompare kun denaskaj parolantoj de Esperanto. Mi esprimas min pli forte pri ĉi tiu punkto ĉar ĝuste tiun eraron mi faris kiam mi komencis instrui, pro la influo de miaj instruistoj, Cseh-seminario, kaj BBC-kursoj de angla lingvo. Mi tuj korektis tiun makulon en mia

instrumetodo kaj post nur kelkaj tagoj - mi ripetu, tagoj - ĉiuj tute kutimiĝis al parolado kaj eĉ pli grave komprenado je la normala rapideco, kaj ek de tiam faris multe pli kontentigan aŭdoparolan laboron. Mi ĵus rimarkis raporton pri lerneĵano kiu ĉeestis la pasintan infankongreson kaj konstatis, ke li multe pli lernis dum tiu semajno ol li estis lerninta dum du tutaj jaroj en la lernejo. Kompreneble la koncentrita medio kaj apartaj motivigoj de infankongreso estas tute speciala fenomenø, sed afable ne diru al moderna lingvo-instruisto ke vi povas lerni pli multe da hispana lingvo per unusemajna restado en Meksiko ol per dujara lerneja kurso. Antaŭe tio estis tute akceptebla kaj akceptita konstato. Diru tion nun en la ĉeesto de profesiulo, kaj mi ne garantias ke vi postvivos la reagon.

Mi diru unu vorton pri la lingva laboratorio pro ties lastatempe furora akceptiĝo en kaj ekster la kadro de aŭdoparolaj sistemoj. En laboratorio la lernanto povas plibonigi sian prononcon, "trolerni" lingvajn strukturojn por aŭtomatigi ilin kaj fari diversajn ekzercojn laŭ la haveblaj materialoj. La laboratorio tamen ne estas iuspeca mirakla lingvolernigilo aŭ ĉionkuracilo, kaj montriĝis ke se la instruisto ne persone partoprenas kaj gvidas la programojn, la plejparto de la lernantoj trovos la sperton tre enua kaj ne multe profita. Ĝi tamen estas sufiĉe valora aldona helpilo, kaj instruistoj de Esperanto ne hezitu uzi ankaŭ tion se ili disponas pri la eblecoj. Mi simil-metode lernas la germanan lingvon samtempe kiel mi instruas la hispanan, kaj trovis konscian uzon de la laboratorio unu el la plej grandaj helpoj. Miaj konkludoj en la nuna artikolo estas samtempe bazitaj sur miaj spertoj kiel lernanto kaj instruisto. Pro la tono de la nuna artikolo mi ne devas nun substreki, ke miaj spertoj estis pozitivaj - por neadekvate maltroigi.

Mi opinias, ke la novaj metodoj de lingvoinstruado povos ludi gravan rolon en la eĉ pli grandaj sukcesoj kiujn ni certe povos montri en niaj lerneĵaj Esperanto-kursoj. Malgraŭ la streboj de la registaro, la MIA, kaj diversaj aktivaj organizaĵoj kiel la Indiana Language Program (kies agado, parenteze, estas finance kovrita per la Ford-Fondaĵo), ankoraŭ ekzistas granda nesciado kaj apatio - por ne menciigi aktivajn kontraŭstaron en kelkaj kazoj - inter la usonaj lerneĵaj instruistoj de lingvoj. Kiam la rezultoj de novaj metodoj estas pruveble pli bonaj, la instruistoj de Esperanto per aktiva eksperimentado povos nur helpi al la definitiva agnosko de ĝia valoro en la lernejoj. Ni ne plu estas tiel senpotencaj, ke oni povos ignori nin. Dum la pasintaj monatoj ni ne nur atingis unikajn rezultojn per la oficialaj rekonaj en Kalifornio, sed ni tiel sukcese surscenejigis la

demandon pri la instruado de lingvoj ĝenerale kaj aparte Esperanto, ke la nova Direktorino de la lingva programo en Indianaj lernejoj komence de sia unua gazetarkonferenco sentis sin devigita pritrakti la aferon de Esperanto kaj publike eldiri ŝiajn kialojn por kontraŭado de ties instruado en la ŝtataj lernejoj. KREDU MIN, kiam oni komencas doni al ni tian seriozan atenton, ni estas jam survoje. Nekorektajn asertojn oni ja povas refuti, kaj ĉar plejofte asertoj tiuspecaj pri Esperanto enhavas plurajn pruveblajn malĝustaĵojn, ni povos por nia profito kontribui al la fumizo de la vesponesto. En Britujo, centra oficiala instanco povis surdiĝi kaj silenti kiam ĝi ne plu volis aŭskulti al poresperantaj argumentoj, kaj rezulte povis dekreti kontraŭ la allaso de Esperanto kiel ekzamenobjekto por la plej gravaj tutlandaj ekzamenoj. En Usono, tamen, la loka aŭtonomio de administrado de la eduka sistemo malfermas tre pozitivajn eblecojn por persistemuloj, kiel tion bonege montris la Esperantistoj de Kalifornio.

Por plene profiti jamajn sukcesojn kaj ebligi pliajn, ni devos kunigi niajn talentojn por provizi la rimedojn plej taŭgajn por la celo. Ni ĉiam sekvu plej atente ĉiujn disvolviĝojn en la kampo de lingvo-instruado, kaj laŭ la urĝeco de la diversaj bezonoj, faru ĉion eblan por kontentigi ilin per la plej altkvalitaj materialoj. Sed por ne lasi ĉi tiun paragrafon fini la artikolon per tipa Esperantista vortumado enhavanta helan optimismon pri la atingiĝoj de Esperanto en la jaro 2100, mi indiku kelkajn el la projektoj kiujn ni povos survoĵigi kaj eĉ kompletigi jam en la nuna jaro.

Montriĝis necese disponigi al lernejoj kiuj deziras ekinstrui Esperanton kompletan programon kun sonbenda materialo. Tiucele mi persone prilaboras programon de aŭdoparolaj materialoj taŭgaj por uzado en anglalingvaj landoj. Tio estu preparita, se iel eble, por la komenco de la venonta lerneja jaro en septembro. Estas tre dezirinde, ke tiajn projektojn prilaboru komitato; la tempo kaj instrua sperto estas por mi en la nuna jaro minimumaj. Supozeble oni celu krei kurson sufiĉe flekseblan por ke oni uzu la materialojn por diversaj celoj (lerneja, universitata, individua, privatkursaj). Programo konceptita por kurso seninstruista estas preparebla, kvankam por lingvo tio estus el pedagogia vidpunkto malfacile pravigebla. Ideoj kaj kunlaboro bonvenaj! Pro tuta manko de sperto tiurilate, mi ĝis nun lasis la demandon de la elementaj lernejoj, kiuj estas tamen la nuntempe plej fruktodona kampo pro plia kunlaboremo de tiaj lernejoj, relativa (kompare kun la duagrada lernejoj) manko de antaŭjuĝoj, kaj plia lernemo de tiuagaj lernantoj.

S-ino Delgado en Britujo preparis tre bonan programon por helpi al la instruisto de Esperanto en la elementa lernejo, kaj la sekretario de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj (SBET) havas je sia dispono multan taŭgan materialon kiu nur atendas eldoniston. Ĉu sufiĉe gravas nia laboru en la elementaj lernejoj por ke trovu la rimedojn? Multaj el la principoj en la nuna artikolo povus adaptiĝi al la instruado ankaŭ en tiaj lernejoj, sed kiuspecajn materialojn ni disponigu? Ĝis ni ĉiuj kunlaboros, ni ne scios kio estos praktika kaj kio ne. Ĉu instruistoj de Esperanto deziras por la elementa lernejo materialojn similajn al tiuj uzataj por la FLES-programo (Fremdaj Lingvoj en Elementaj Lernejoj)? Alia projekto kiun ni pripensu ĉijare estas la preparo de malgranda gvidlibro por la instruisto de Esperanto, verkita el la vidpunkto de lingvisto, kiel jam ekzistas almenaŭ por la franca kaj hispana lingvoj.

Aliajn eblajn projektojn mi priparolis en la ĉefartikolo. La eldonado ĉiam prezentas problemon, tamen ĉe la preparo de novaj materialoj oni kutime faras unue provlibrojn per multobligado aŭ fotokopiado. Post kiam oni plene provis ilin, tiam oni povos fari necesajn ŝanĝojn antaŭ ol reeldoni la materialojn presitaj. Tio ŝajnas esti la solvo por la projektoj, ĉar dum kaj post eksperimenta periodo ekzistos ĉiam ebleco ricevi de iu fonto subvencion por kovri postajn kostojn. Sed ni eklaboru tuj. Duagrada lernejo trovas malmulton uzeblan en nia nuna stoko de lerniloj, kaj certe egale mankas tiaj por la unuagrada. Ni do decidu dum 1965 kion ni deziras havi por la instruado de Esperanto en niaj lernejoj - kaj ni prilaboru kiel eble plej ĝisdatajn materialojn tiel ke novaj instruistoj kaj nove interesitaj lernejestroj povu sen malfacilaĵoj enkonduki la grandajn avantaĝojn kiujn proponas la studo de Esperanto al iliaj lernantoj. Ni ne forgesu, ke la nuna jaro prezentas unikan okazon por ni!

Duncan Charters

R E C E N Z E T O J

1/ NI PAROLU ESPERANTON A First Book of Oral Esperanto.
R.H.M.Markarian, E.R.D., M.A., F.B.E.A.

Tiu nova lernolibro por komencantoj estas unu el serio eldonata por diversaj lingvoj de la UNIVERSITY TUTORIAL PRESS en Cambridge, Anglujo. Ni nun fine disponas pri taŭga libro konceptita en moderna formato kaj laŭ modernaj instru-principoj. Dek scenoj el la ĉiutaga vivo facile paroligos la lernantojn en la lingvo.

Instruistoj, kiuj deziras emfazi la akiron de flua parol-
kapablo, povos uzi tiun lernolibron kiel suplementon al jam
uzata lernolibro por variigi la enhavon de la lecionoj.
Espereble multaj usonaj instruistoj aĉetos ĝin per iliaj klasoj.
Solan vendorajton en Usono havas la ESPERANTO PUBLISHING COMPANY
OF NORTH AMERICA ĉe 180 Riverside Drive, New York, N.Y. 10024.
(La prezo kredeble ne superas \$1 - enketu pri amasmendoj).

- 2/ INVITATION TO LINGUISTICS Mario Pei.
A Basic Introduction to the Science of Language.
(Doubleday, New York 1965, \$5.95)
- 3) THE ABC's of Languages and Linguistics. Chilton Books.
Jacob Ornstein & William W. Gage.

Tiuj du novaj libroj estos interesaj al la Esperantisto kiu
deziras havi bazan scion en la unua kazo pri la lingvoscienco
ĝenerale, kaj en la dua pri la aktuala situacio de lingvo-teorioj
kaj lingvo-programoj en Usono. La libro de Pei estas bonega
konsult-libro pri terminologio, kaj li prezentas nin al tiu nova
studkampo kiun li nomas "geolingvistiko", t.e. la studo de la
lingvoj de la mondo. Li mencias Esperanton preskaŭ nur rilate
terminologion de planlingvoj. Se vi preferas faktojn al polemiko,
kaj ne aparte ŝatas Robert A. Hall, Jr., jen la libro por vi.
La dua libro donas bonan super-rigardon pri la nuna situacio en
lingvaj studoj, kaj karakteriziĝas per multaj tre ĝisdataj faktoj
kaj statistikoj (inkl. pri la Dia Komedio kaj aliaj lastatempaj
okazaĵoj en la kampo de Esperanto). Kvankam la faktoj pri
Esperanto estas ĝenerale korektaj, la ridetante ironia sinteno de
la aŭtoroj bone reflektiĝas en la titolo de Ĉapitro 11, "The
Dream of a World Language", iom tipa studo atendebla en tia libro.

JEN jam invadis Oregon-on, kaj nun ekzistas Esperanto-grupo ĉe
Portland (Ore.) State College. Malgranda, tamen vigla, la ĵus-
naskita grupo kunvenas kune kun sep aliaj lingvaj grupoj ĉiujn
ĵaŭdojn en la manĝejo. La ses grupanoj, sub la gvidado de Tom
Davidson, konversacias dum duhora sesio. La Estraro de Studentaj
Aferoj prezentis al ĉiu lingva grupo flagon de la lando kies lingvon
ili parolas, kaj eĉ la Esperanto-grupo ricevis Esperantan standardon!
S-ro Davidson ankaŭ informis nin pri speciala prezo de ĉambroj ĉe la
13-a nacia kongreso de Esperanto (ELNA) okazonta en Portlando.
Kvar personoj universitatanaĵ povos resti en unu ĉambro je \$4 por
unu persono. Krome, bonvolu noti ke la kongres-kotizo por
universitatanoj estas nur \$5 anstataŭ ol \$10 por plenaĵuloj.

E N H A V O

Paĝo

3	Ĉefartikolo - Ni Pensu!.....	Duncan Charters
5	"DX": Radioaŭskultado kiel flankokupo....	Richard E. Wood
10	Esperanto - Nacia Lingvo?.....	Dovra Soleo
13	D-ro Mizantropo: "Zamena Hofilo".....	"Kial Ne?"
14	Zvilgulbo.....	"Pacifisto"
15	The Beatles.....	T. G. Page
16	Deziras korespondi	
17	La Aŭdo-Parola Metodo de Lingvo- Instruado kaj ties Apliko al Esperanto	Duncan Charters
25	Recenzetoj:	
	1/ Ni Parolu Esperanton	
	2/ Invitation to Linguistics	
	3/ The ABC's of Languages and Linguistics.....	DC
26	Novaĵoj de JEN-Grupo.....	Tom Davidson